PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



N-ro 5/1975 - 5 feb 1975
Aperas ĉiusemajne

## UEA-delegito ĉe ambasadora akcepto

Bonn (pp/eh) La 27an de januaro 1975 invitis la aŭstralia ambasadoro, Ralph Harry kaj lia edzino, okaze de la aŭstralia nacia festtago la ambasadorojn, eminentulojn el politiko, ekonomio kaj kulturo, inter aliaj ankaŭ la UEA-delegiton de Bonn, Erhard Herlitze kun edzino, al vespera akcepto en la "Ora Salono" de la Hotelo "Königshof" en Bonn. La akcepto estis samtempe adiaŭa ceremonio: Ambasadoro Ralph Harry forlasos Bonn por reprezenti sian landon ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko.

La UEA-delegito havis okazon danki al la ambasadoro ne nur pro la invito, sed ankaŭ pro la helpo kaj granda ekpuŝo de Esperanto kaj de la ideo de internacia lingvo dum lia tri-jara restado en Federacia Respubliko Germanujo.

Sinjoro Herlitze, komisiito por Esperanto ĉe la Germana Fervojo en la distrikto Kolonjo, transdonis al la ambasadoro leteron de la prezidanto de la Asocio de la germanaj fervojistoj-esperantistoj kaj deziris al la ambasadoro kaj al lia ĉarma edzino ĉion bonan, sanecon kaj estontece sukcesplenan laboron kiel ambasadoro ĉe la Unuiĝintaj Nacioj kaj ankaŭ por nia komuna ideo de la internacia lingvo Esperanto.

## Esperanto-Restoracio malfermita

Paderborn (pp) Nun la Esperanto-restoracio en Paderborn havas oficialan Esperanto-nomon: "Tönnchen" - Esperanto - "Bareleto". En ĉeesto de televido, radio, gazetaro kaj Esperantogastoj la inaŭguro okazis merkrede, la 5an de februaro 1975, je la 11a horo.

Kiel ni jam informis antaŭe la menukartoj de tiu restoracio estas en germana lingvo kaj en Esperanto. La estro de la restoracio, G. Roos, lia edzino kaj kelnerino, parolas aŭ lernas Esperanton.

En la restoracio kunvenas la membroj de la Esperantoklubo Paderborn.

Jen la adreso de la restoracio: Restoracio Gastejo "Bareleto", Estro G. Roos, 479 Paderborn, Kasseler Straße 1, Telefono 28119

## Pollando - nombroj kaj faktoj

Varsovio (pp) Eldonejo Interpress, Varsovio, eldonis ilustritan broŝuron poŝformatan en Esperanto sub la titolo: Pollando - nombroj kaj faktoj. Inter la 11 ĉapitroj pri politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj sciindaĵoj estas ankaŭ ĉapitro pri "La Esperantista movado en Pollando" verkita de Jerzy Grum, tiu ĉapitro ampleksas 8 paĝojn. La broŝuro estas senpage havebla ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Formato 11,4 x 15,8 cm, 76 paĝoj, plus 32 ilustritaj paĝoj.

La broŝuro aperis okaze de la Jartrideko de Popola Pollando.

## Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso

Rotterdam/Kopenhago (pp). Ĵus aperis la 4a numero de la Oficiala Komuniko pri la UK en Kopenhago. El ĝi ni citas:

### Inaŭguro - Eksperimenta dispartigo

Por Kopenhago la Estraro de UEA decidis dismeti la kutiman programon de la Inaŭguro en du partojn. Ju pli multiĝis en la lastaj jaroj la nombro de registaroj kaj aliaj instancoj reprezentitaj en la Universalaj Kongresoj, des pli sentiĝas la pezeco de ofte trihora solenaĵo. En Kopenhago, do, la pli solena parto okazos matene, kaj en la posttagmezo sekvos dua parto iom malpli formala, kiu samtempe enkondukos la kongresajn laborkunsidojn.

### Temoj de laborkunsidoj

En sia kunsido de 1975 01 11-12 la Estraro de UEA decidis, ke la ĉefa temo de la Kongreso en Kopenhago - kaj sekve ankaŭ de unu el ĝiaj ĉefaj laborkunsidoj - estu "La virino", okaze de la Internacia Jaro de la Virino (proklamita de UN). Krome estas elektita dua temo: "La rolo de la individuo en la Esperanto-movado", kiu estos pritraktita en novstila kunveno. Unue diskutos ĝin malgrandaj laborgrupoj, en kiuj povos partopreni ĉiuj ĉeestantoj, sub gvido de komitatanoj de UEA, kaj poste iliaj konkludoj estos prezentitaj al la pleno. La celo de tiu aranĝo estas aktivigi kiel eble plej multajn kongresanojn en rekta diskutado.

### Dua Bulteno en preparo

Post kelkaj semajnoj estos ekspedita al ĉiuj kongresanoj, kiuj ĝis tiam aliĝis, la Dua Oficiala Bulteno, 32-paĝa ilustrita kajero enhavanta ĉiujn necesajn informojn kaj mendilojn por loĝado, ekskursoj, bankedo, postkongreso ktp.

### Infana kongreseto

Infanoj aĝaj de 6- ĝis 13jaraj kaj kapablaj kompreni kaj paroli Esperanton estas invitataj aliĝi al la 15a Internacia Infana Kongreseto por kunloĝi, ludi, ekskursi kaj interamikiĝi kun infanoj el aliaj landoj. Kotizo: 300 danaj kronoj (132 gld.); por plia frat(in)o: 250 kronoj (110 gld.). Petu aliĝilojn ĉe la LKK aŭ ĉe la konstanta adreso en Rotterdam.

### Aliĝintoj ĝis la 75-01-31

Ĝis la 75-01-31 aliĝis al la kongreso 603 personoj el 39 landoj. FR Germanio tenas laŭ la nombro de aliĝintoj la duan lokon kun 62 kongresanoj post Danlando kun 102 kongresanoj.

***************

## Invito al regionaj kunvenoj

Offenbach. (pp) Rejn-Majn-Esperanto-Ligo (ROMOLO) invitas al sia printempa kunveno en Offenbach, dimanĉe, la 16an de marto 1975, je la 10a horo en Kolpinghaus, Offenbach, Luisenstr. 53. La kunveno okazos en formo de"Tago de malfermita pordo", por kiu oni invitas ankaŭ interesulojn kaj novulojn.

Ulm.(pp) La distrikt-komisiito por Esperanto de la fervoja direkcio Stuttgart, Siegfried Krüger, invitas ĉiujn fervojistojn-esperantistojn kaj ĉiujn Esperanto-amikojn al jara kunveno en Ulm, Hotel Casino, Zinglerstr. 11, sabate je la 1a de marto 1975, 15a horo. El la programo: Sonfilmo de W. Barnickel pri la 26a IFEF-Kongreso en Tarragona 1974, prelegoj pri vojaĝoj tra Sovetunio de Otto Walder, Romanshorn, kaj Dr. H. Breuninger, Ulm.

## Pola Esperanto-Movado en 1974

## Raporto laŭ elsendo de Pola Radio, Esperanto-Redakcio

Varsovio. La dua duono de decembro estas laŭkutime tempo de sumigoj de la tutjara agado en la diversaj vivsferoj. En la kazo de niaj radio-elsendoj valoras fari agad-sumigon pri la Esperanto-movado de la lando, el kiu ni disaŭdigas niajn programojn.

Unualoke ni deziras priparoli la instruadon de Esperanto, al kiu ĉiam la polaj esperantistoj dediĉis kaj dediĉas multe da atento. Ĉi-jare oni klopodis pri la plialtigo de la instruistaj kvalifikoj. En la dua duono de julio kaj komence de aŭgusto okazis en Gdansko TUTPOLLANDA METODIKA KURSO dum kiu dudek-kelkaj E-instruistoj kaj kandidatoj je kurs-gvidantoj studis ne nur la problemojn de la plej efikaj instru-metodoj, sed ankaŭ paralele konatiĝis kun diversaj organizaj demandoj de nia movado. Metodikaj prelegoj, tutspeciale pri la spirala instruado de Esperanto, okazis inter aliaj en Sopot, Gdansko kaj Bydgoszcz. En ĉi-lasta urbo okazis en aŭgusto tutpollanda seminario metodika dediĉita ĝuste al la spirala instruado de Esperanto.
Parolante pri la plialtigo de la instruistaj kvalifikoj, valoras substreki, ke oni organizas ankaŭ en pluraj lokoj memlernadon pri la metodiko de fremdlingva instruado, kiu oftfoje finiĝis - kiel ekzemple en Varsovio - per ekzameno en la Instruista Instituto kaj ricevo de diplomo pri instrukapablo.

Al demandoj de la E-instruado estis dediĉita aparta studenta esperantista seminario okazinta printempe en Varsovio kun la partopreno de polaj kaj eksterlandaj kursgvidantoj. Polaj kursgvidantoj atingis ankaŭ sukcesojn eksterlande. Intensajn kursojn de la internacia lingvo poloj gvidis en du lokoj en Germana Demokratia Respubliko kaj en tri lokoj en Finnlando.

Same kiel en la pasintaj jaroj ankaŭ 1974 tre sukcese disvolviĝis la korespondaj kursoj gvidataj de la Ĉefa Estraro de PEA. Sume partoprenis ĉi tiujn kursojn en la 4 semestroj preskaŭ 5.000 personoj.

Parolante pri la instruado oni devas ankaŭ mencii pri porkursaj eldonaĵoj. En 1974 PEA reeldonis en 5.000 ekzempleroj la lernolibron "Esperanto - podrecznik jezyka miedzynarodowego" ( Esperanto - lernolibro de la internacia lingvo), kaj en 3,500 ekzempleroj la lernolibron "Praktika kurso de Esperanto".Oni organizis tutlandan konkurson pri nova lernolibro al kiu estas anoncitaj du projektoj, sed estas nun tro frue paroli pri elekto de tiu aŭ tiu. Ĉiukaze oni pensas tre multe pri la plivastigo de la sortimento de la uzataj lerniloj.

(Fino sekvos!) A. Pettyn

*****************************

## Konkurso de Pola Radio

En la 1975 j. pasos la 30a datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno Pola Radio petas pri respondo al jena demando: "Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta
30a datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo
de la dua mondmilito?"

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.
La leterojn oni sendu ĝis la 9a de majo 1975 al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando, en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso".

Du novaj informbroŝuroj germanlingvaj

Das Problem: Eine Internationale Sprache

Die Lösung: Esperanto

Sub la titolo "La problemo: Internacia Lingvo - La solvo: Esperanto" aperis nun la germanlingva traduko el la Esperanto-broŝuro de la Itala Socialdemokrata Partio. La broŝuro ampleksas 8 paĝojn kaj bonaspektan kovrilon. La tradukon prizorgis Dieter Hartig kaj Joachim Gießner, kontrollegis Dr. Werner Bormann; eldonis ĝin Germana Esperanto-Asocio, Hamburg, kunlabore kun Germana Esperanta Fervojista Asocio, Frankfurt/M.
Libroservo Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2112, disponas pri 500 ekzempleroj kaj vendas ilin al unuopaj interesuloj. Prezo por 1 ekz. -,70 GM inkl. sendkostoj, por 5 ekz. 2,50 GM inkl. sendkostoj, 10 ekz. 4,50 GM inkl. sendkostoj.

Nova varbbroŝuro de GEJ

Germana Esperanto-Junularo eldonis en 10 000 ekzempleroj varbbroŝuron sub la titolo "Wir informieren" (Ni informas). Sur la dekdu paĝoj troviĝas 9 bildoj kaj koncizaj tekstoj pri la celo de Esperanto kaj Germana Esperanto-Junularo. La broŝuro estas destinita varbi novajn interesulojn kaj membrojn. Ĝin povas uzi ankaŭ lokaj grupoj kaj unuopaj aktivuloj en sia varba agado. La prezo por 1 ekzemplero estas -,10 GM. Mendu ĉe: Deutsche Esperanto-Jugend, 6731 St. Martin, Maikammerer Str. 21.

Esperanto en radio

Varsovio. Nun ni scias certe: La Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevis dum 1974 3 021 korespondaĵojn de aŭskultantoj. La redakcio konfirmis la ĝustecon de tiu nombro en sia lasta leterkesto. Tiu nombro ne entenas la respondojn al "Konkursoj". Dum januaro alvenis pli ol 550 leteroj kaj poŝtkartoj, sendube granda nombro. Tamen oni devas konsideri, ke januaro alportas multajn novjarajn bondezirojn ktp. Pola Radio ankaŭ konatigis la nomojn de la 20 aŭskultantoj, kiuj plej ofte skribis al la stacio dum 1974. Pro teknikaj kaŭzoj ni hodiaŭ ne povas citi la nomojn kaj landojn de tiuj skribemuloj, kiuj cetere ricevos apartan diplomon. Ankaŭ en januaro el Finnlando venis la plej multaj leteroj, cetere dank' ĉefe al unu aŭskultanto. FRG ĉi-foje nur rangas sur la 6a aŭ 7a loko! Certe por la redakcio de Esperanto-elsendoj gravas la nombro de leteroj kaj poŝtkartoj alvenantaj. Tamen laŭ nia opinio estas pli grava la nombro de aŭskultantoj regule aŭskultantaj la elsendojn. Pro tio estus foje interese ekscii, kiom da aŭskultantoj dum unu monato konfirmis la aŭskultadon, kvankam kompreneble la nombro de faktaj aŭskultantoj ĉiukaze estas pli granda ol estas konstatebla el la enirantaj korespondaĵoj. - La komentarioj kaj opiniesprimoj rilatantaj al la rilatoj inter FRG kaj Pollando estis pli "malmildaj" dum la pasintaj semajnoj ol en antaŭa tempo. Tio rilatas speciale al la problemo de pago de financa kompenso al la viktimoj de la germanaj koncentrejoj, kiu por la pola flanko fariĝis principa demando bremsanta aŭ eĉ haltiganta la normaligadan procezon, la problemo pri la ŝtatanecoj de la du germanaj ŝtatoj, aktualiĝinta pro la interveno de FRG-diplomatio en Vieno. Ankaŭ la Strauss-vizito en Pekino provokis akran kritikon, kiu fakte ne surprizis.
Zagrebo. Post la kutimaj informoj el Jugoslavio la Esperanto-programo elsendis radian humuraĵon, sekvante la Zagreban tradicion, en la elsendo dum la karnavala semajno ne esti tro serioza. Multaj viroj aŭ edzoj estus feliĉaj se ili trovus araban sorĉiston, kiu sukcesus mutigi la edzinon "manĝante nevideblajn fiŝojn" kaj fari el tio eĉ profitdonan negocon por la edzo. Ke tiu "virina ekspluatado" kontraŭas la celojn de la "Jaro de la Virino" certe estis nura hazardo!